


Kajeroj *el la Sudo*



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



N-ro 21 - JAN - FEB - MARTO - 1994



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: Martín Bustin Benito

Nuevas Lomas, sec. 2, part. 13, bloq. 1, P-7, 2-A

03015-ALICANTE. (Hispanio)

Sekretario: Jesus de las Heras Giménez

Av. Juan Carlos I, 24, 2/G, Edif. Nueva Ronda, 1

30008-MURCIA.

Kasisto: Nicolas GIL Carballo

Apartado 305, 24080-LEON.

Envios de cotizaciones sin coste adicional a nombre del mismo, desde cualquier punto postal de España, a la Cartilla Postal nº 29-85.039.477.

Redaktoroj de la bulteno:

Antonio Marco Botella

Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.C.

50002-Zaragoza. (Hispanio)

Miguel Fernández Martín

C/ Santa Genoveva, 58. 6º C.

28017-Madrid. (Hispanio).

Kovrilo: Félix Carrasquer, sindikata gvidanto, verkisto kaj ideologo, forpasinta antaŭ kelkaj semajnoj.

Enhavo:

Kien ni iras, laboristoj?	3/4	pg
Kvin fratoj de familio Carrasquer	5/6/7	"
Bonvolu ridi... sed ne trol	8/9	"
Poetoj malaganoj	10/11 /12	"
Recenzo: Antologio de Franca Literaturo	13	"
Raporto al PEKOTEKO pri la neologisma radiko "kompjut"	14/15/16	"
Jen nia packolombo	17/18/19	"
Recenzo: "Infero en aŭtuno"	20	"
Korespondadi deziras	21	"
La Movado en kaj ekster Iberio	22	"
Administra angulo	23	"

KIEN NI IRAS, LABORISTOJ?

Ni ne tro komprenas ciferojn, sed ja faktojn. Ekonomikistoj manipulas indicojn, parametrojn, statistikojn por pravigi la politikajn starpunktojn de la diversaj regantaj klasoj. Ni la iama "laborista klaso", nenie regas, do nur trasuferas la sekvojn. La disfalo de la fer-kurteno, kiu signifis por multaj homoj promeson de pli libera mondo, ne alportis ankoraŭ demokration transe -male, ve!, militojn, streĉiĝon, mizeron.. -kaj cise provokis alian disfalon: tiun de la kapitalista timoj al la "ruĝula fantomo", dank' al kiuj la justa batalado far la cisaj laboristoj por la atingo de socialaj plibonigo multfoje kroniĝis per sukceso.

Ni ne tro komprenas ciferojn, sed ja faktojn. Ni ne komprenas, ekzemple, ke en unu sola jaro povas radikale ŝanĝiĝi la signo de ajnlanda ekonomio. En 92 oni mesaĝis al ni, hispanaj laboristoj, pri nia enviinda prospero. Hispanio gapigis la mondon: propralume brilaj olimpikoj en Barcelono, "Expo 92 en Sevilo, "Madrido, Eŭropa Kultura Urbo"... Apoteozo. Tamen kiam ni petis nian respondan parton de tia prospero, oni ekparolis al ni pri terura krizo, el kio dedukteblas, ke ni aŭ ne tiel riĉis -kaj oni devigas nin la ĉiamulojn, surpreni la koston de tia fikcia parvenueco- aŭ ne tiel malriĉas

Ni inklinas al la unua hipotezo. Krizo palpeblas. Ne nur en Hispanio Krizas, entute, la sistemo. Senlaboreco skurĝas eĉ laboristojn de landoj tradicie imunaj kontraŭ tia plago. Rajto je laboro, ordinare agnoskata konstitucie, iĝas ĉiam pli privilegio. Ĝeneraliga nedaŭra dungiteco, aĉiĝo de la laborkondicioj, kreska sendefendeco antaŭ la arbitraĵoj de trokuraĝiĝintaj laboristoj... Jen la komuna kadro, kie deruliĝas nia pan-dona agado, krescende angor- kaj tensi-genera

Sed plenigas la glason jena plia gutto: oni sisteme senigadas



nin je socialaj bonoj, tiel strebplene -foje eĉ sange- konkeritaj per la iam inte nomata "klas-batalo". Oni intencas redukti la historion de la laborista movado al simpla anekdoto manka je signifo kuntekste de la homa aspiro al justa soci-ordo. Kaj tiafon plenumas registaroj ne nur reakciaj sed ankaŭ tia memnomataj progresemaĵoj. La brita dekstrularo lastatempe sinkigis unu el la plej laŭdindaj sistemoj de sociala asekuro, atingitan pere de modela sindikatisma lukto. Sed en landoj administritaj de t.n. "socialismaj" partioj -kia eŭfemismo! kia mistifikoj!- ne pli kontentige disvolviĝas nia afero. La nunaj "socialistoj" montras sin senegalaj mastrumantoj de la kapitalisma interesoj. En Hispanio, ekzemple, tiaj kavaliroj de plej rafinita demagogio ratifikas kaj dekretas tian regreseman politikon. Adiaŭ do al la neniam plene ĝuita reĝimo de bon-stato. Minacatas pensioj de emeritoj, socialaj servoj, maldunga mono. En ĉi momento de la historio ni, kiuj ne komprenas ciferojn sed ja faktojn, trovas nin ree defendantaj taŭtologiojn kie jenan: oni kontraŭatakas senlaborecon nur kreante labor-postenojn. Ĉar la hispana "socialisma" registaro pretendas ni konvinki, ke el libera maldungado ŝprucos la solvo al niaj problemoj. Kaj tian bufon ni ne volas engluti.

Kien do ni iras, laboristoj? Nur ni havas la respondon. Nia reago ne povas esti alia ol mobiliziĝo kontraŭ la forto pretaj retroveni nin en la paseon ignorante traŝvititaj etapojn kaj la enorman potencialon en niaj manoj. Tiela prikonsciis la aferon la belgaj kamaradoj, kiuj novembre, ĉe la unua ĝenerala striko okazinta en Belgio post la tridekaj jaroj, sukcesis sidigi sian registaron por traktado de labora depostuloj. Tiela rigardas la prezencon milionoj da hispana laboristoj, kiuj ĉe la apero de ĉi numero de nia gazeto estoj jam realigantaj -sendube sukcesplene, se juĝi laŭ la nunstato de socia indigno- sian de longe anoncitan ĝenerala strikon.

"Kajeroj el la Sudo", organo de la hispanaj laboristoj esperantistoj, varme apogas tiajn justajn esprimojn de protestoj kontraŭ antilaboristaj strategioj rajto-tretaj.

Nenia ekonomikista truko ŝancelu la firman konvinkon de la laboristaro pri tio, kie kuŝas ĝia vero kaj ĝia forto, nome en ĝia historio kaj en ĝia unueco. La cetero estas nur ciferoj. Kaj ni, laboristoj, ne tro komprenas ciferojn, kvankam ni-mal-

kiel niaj regantoj- konscias pri tia manko. Jen unu el ni grandecoj. Lao-Ĉe, la plej granda saĝulo en la homa historio asertis antaŭ dudek ses jarcentoj: "Plej grandas kiu scias, s nescia". Ni pruvu al la potenculoj, ke nescii ne signif stulti.

LA REDAKCIO

KVIN FRATOJ DE FAMILIO CARRASQUER



Je la jarfino forpasis en Francio Félix Carrasquer, aŭtoro de pluraj gravaj verkoj pri liberecana ideologio. Iama Kataluna Regiona Sekretario de CNT unue, kaj, post ol li estis enkarcerigita en la 50-aj jaroj, Ĝenerala Sekretario de la hispana sindikato Nacia Konfederacio pri Laboro (CNT).

La familio Carrasquer adoptis kiel vivosistemon la teorion pri la memadministrado, kies principojn liberecanajn membroj de tiu familio, kune kun aliaj presitaĝaj anarkistoj, pretendis transloki al la vivo reala de kamparanoj ĉe la bordoj de rivero Cinca (Aragono) en la jaro 1934, proklamante la liberecanan komunismon. La tiamaj respublikaj aŭtoritatuloj enkarcerigis kiel responsulojn de tiu familio tri najbarojn de la urbeto Albalate: la kuraciston, la instruiston kaj la sekretarion de la urbestro, k-don Carrasquer. La filo de tiu ĉi lasta, Félix, forkuris dumnokte tra la montaro, ĝis li atingis Lleida, kie li serĉis rifuĝon. Oni povis nur akuzi lin kiel instiganton al la kolektivigo de la grundo de duko Solferino.

La unua el la fratoj de tiu familio, Félix Carrasquer, sentis tiel grandan inklinon al la legado, ke li ne donis al si ripozon por satigi tiun emon, tiel intense, ke, kiam, li estis 27-jara, li iĝis tute blinda. Firme konvinkita pri la liberecanaj ideoj, li komunikis saman ideologion al siaj gefratoj kaj disvastigis ĝin tra la tuta regiono. Félix disvolvis intensan taskon fondante lernejojn en Albalate, Monzón kaj Barcelon en kiuj li mem lernigis per tute racia sistemo, plenumante

meritoplenan instruan laboron.

Post la hispana intercivilitana milito, dum regado de diktatoro Franco, Félix iris dum dek jaroj de unu al alia ŝtata prizono. Li estis mortkondamnita, sed la ekzekuto, feliĉe neniam okazis. Ekzilita en Francio, li verkis plurajn librojn pri liberecana ideologio kaj tie forpasis antaŭ nelonge.

La dua el la fratoj Carrasquer, Antonio, suferis grava malsanon, poliomjeliton kiu kondamnis lin al rulseĝo ĝis forpaso, kiam li estis 50-jara. Li helpis sian fraton Félix en ĉiuj taskoj, kiujn lia plej aĝa frato entreprenis.

La tria el la fratoj estis Francisco, batalanto en la hispana intercivilitana milito en la 26a divizio respublikana t.e. la mita brigado "Durruti". Li fariĝis kapitano de la Respublika Armeo en la Respublika Militlernejo starigita dum la milito en Valencio. Post la milito li restis en pluraj koncentroj kaj denove batalis dum la mondmilito kontraŭ la germana trupoj en Francio. Post la mondmilito li studis Psikologio en la Universitato Sorbono de Parizo. En 1953 li vojaĝis al Nederlando, kie li studis kaj diplomiĝis pri Literaturo en la Universitato de Groningen. Li kunlaboris en la Internacia Sekcio, fako hispana de Radio Netherland kaj post tio translokiĝis al Amsterdamo, kie li doktoriĝis en la Universitato de Leiden. La tezon, kiun li prezentis, temis pri la fama verkisto Ramón J. Sender. Logike! ĉar lia familio kaj tiu de Sender devenis de sama regiono: Albalate kaj Chalamera, naskiĝlokoj de ambarfamilioj, estas disigitaj nur de rivero Cinca. Francisco estas nun katedra profesoro kaj disvolvas gravan intelektan taskon.

La kvara el la fratoj, José, estis la filo dorlotata de la familio, la plej amata kaj inteligenta el ĉiuj kaj firma espero de la plej brila estonto. Antaŭe al la hispana intercivilitana milito li fariĝis instruisto, kiam li estis nur 19-jara kaj tuj praktikis tian profesion. Dum la milito li batalis kun sia frato Francisco en la divizio "Durruti", ĝis li estis destinita kiel kapitano de la 28a divizio, la brigado "Ruĝa kaj Nigra". Lia frato Francisco kunportis lin grave vunditan sur propraj ŝultroj plurajn kilometrojn tra la batalkampo de Aragono, ĝis mitrajlo trafis lin. Post terura batalo korpo kontraŭ korpo li, la admirata José, aperis morta, ĉirkaŭita de malamikaj maŭroj ĉe la fronto de Valencio. Liaj soldatoj tiom amis

lin, ke eĉ ne unu estus dubinta doni sian vivon por savi lin. Liberpensanta homo kaj liberecano konvinkita, li estis adorata kaj ne nur de liaj fratoj, sed ankaŭ de ĉiuj, kiuj kun li kunvivis. Lia morto estis tre dolore sentita!

La kvina kaj lasta el la kvinopo estis fratino Presentación. La granda influo politika de ŝiaj fratoj donis al ŝi fortan personecon ĝis tia grado, ke ŝi montriĝis kun profunda konscienco doktrina. Ŝi helpis sian fraton Félix en la instrua tasko kaj en ĉiuj liaj ideologiaj entreprenoj. Post la interciivitana milito ŝi provis fariĝi monaĥino kaj vizitis plurajn religiajn kolegiojn, sed baldaŭ ŝi konvinkiĝis, ke kunvivi en sendiskuta obeado estos nebla precepto aplikebla al ŝi, kaj forlasis la projekton. Ŝi estis la sola persono de sia familio ne persekutita de la diktatora reĝimo. Hodiaŭ ŝi loĝas en Albalate de Cinca (Aragono), en tiu urbeto, kie en 1934 oni proklamis la liberecanan komunismon, evento neofta, malfacile trovebla en la historio de sociologio.

La forpaso de Félix Carrasquer en Francio, la plej aĝa frato, aktualigis la dramon de tiu familio, konsistanta el homoj eminentaj kaj kuraĝaj: tri el ili jam mortis, unu estas katedra profesoro kaj scienco-esploristo, la fratino restas tie, en la aragona Albalate, eble revante, ke iun tagon, oni ne scias kie, la kvin fratoj renkontiĝos!

Antonio Marco Botella

BONVOLU RIDI... SED NE TRO!

Ĉu prave?

Ŝtata inspektoro vizitas frenezulejon. Al malsanulo kunn aspekto tute trankvila kaj normala li demandas: -Kial vi estas ĉi tie?

-Ĉar plaĉas al mi pli la ŝuoj ol la botoj.

-Sed tio ne estas sufiĉa motivo por enfermi vin en tiu ĉi loko. Mi mem pli preferas ŝuojn al botoj.

-Ĉu jes? Kaj kiaj vi preferas ilin, ĉu krudajn aŭ frititajn?



Bonvolu ridi... sed ne tro!

Sen probabla dubo!

Oficisto estis pleniganta demandfolion disdonitan de lia administracio. Ĉe la demando: "Kiu estas via rekta superulo"? li senhezite skribas:

"Mia edzino".

Maldiskreta ripeto

La edzino: -Ĉu estas dece veni je ĉi tioma horo?

La edzo: -Estas nur la unua matene, kara edzineto!

La edzino: -Grandega mensogulo, jen ĵus batis la tria!

La edzo: Ho, ne, karulineto! Nun ja estas la unua, kvankam ŝajne la horloĝo ripetis la horon kvar fojojn, por ke vi aŭdu ĝin pli bone!

Utila sperto

-Ĉu vi volas prunti al mi mil pesetojn?

-Mi ne konas vin. Kial vi ne petas tiun favoron al amiko aŭ konato?

-Ĉar mi scias proprasparte, ke neniu konato volas prunti al mi eĉ unu peseton!

Konversacio pri sonĝoj

Bonaj amikoj renkontiĝas surstrate, unu el ili kun tre pala vizaĝo. Demandite de la alia pri tio, li respondas:

-Mi bonfartas, sed ankoraŭ mi estas sub la terura impresio de sonĝo, kiu suferigis min dum la lasta dormado. Jen mi troviĝis sen armiloj en afrika dezerto, kie furioza leono persekutis min; pro elĉerpitaj fortoj mi falis teren, la bestego tuj kapitis min sub siajn ungegojn, mia karno estis ŝirata... terura morto estis neevitebla, kiam la voĉo de mia edzino vekante min liberigis mian animon de tiel kruela aventuro.

Al tiu angora rakonto respondas la alia:

-Ho, ankaŭ mi havis amaran sonĝon hieraŭ nokte. Sur florplena paradizo, bela junulino persekutis min, ŝia delikata maneto trafis mian dekstran brakon altirante min al si, kaj ĝuste kiam ŝiaj lipoj estis proksimaj al la miaj... mia edzino vekis min dirante: -Dormemulo, ellitiĝu, vi devas iri al la laboro, ĉar estas jam la oka matene!... *****



Malbonŝanca edzo

S-ro Longakorno babilas kun amiko:

Jes, vere mi estas tre malbonŝanca - kompare kun mia edzino. Antaŭ unu semajno, ŝi trovis dum mia foresto

altvaloran braceleton, kiu vere mirinde kaj tute hazarde adaptiĝas al ŝia mezuro. Pasintan semajnon, ŝi gajnis en loterio belegan pelton, ankaŭ plene laŭmezure. Tamen, reveninte de mia vojaĝo, mi trovis sub mia lito pantoflojn, kiuj estis tro grandaj!

-Malbona ŝanco la mia, ĉu ne?

Opinio pri manĝo

Du esperantistoj konversas pri la Zamenhofa-taga vespermanĝo, okazinta en prestiĝa restoracio. Unu el ili, ne povinte partopreni, demandas la alian:

-Ĉu vi bone manĝis en tiu fama restoracio?

-Ne, tute ne; se la supo estus tiel varma, kiel la vino; la vino tiel maljuna, kiel la meleagro; kaj la meleagro tiel karnoriĉa, kiel la kelnerino...vere ja tiel estus bonega la tuta manĝo!

Inter ŝtelistoj

-Kaj, kiam ĵus mi ŝtelis la horloĝon al kunvojaĝanto, li diris al mi:

-Ĉu vi deziras scii, kioma horo estas nun? La unua! kaj li donis al mi teruran pugnobaton.

-Vi estis tre bonŝanca- diris la alia ŝtelisto, ĉar se anstataŭ pri la unua, temus pri la dekdua...

Pri kuracistoj

Okulisto al miopulo:

-Ĉu vi kapablas vidi tiujn literojn, kiuj montriĝas sur la tabulo?

-Ki...ki...kie estas la tabulo?

Senpripense


Almozulo al preterpasanta kuracisto:

-Sinjoro, mi malsatas! -Bona, tre bona simptomo!

POETOJ MALAGANOJ

Malago, la urbo kie ni kongresos venontjare, havas longan tradicion pri fascino kaj sorĉo. Tero de poetoj kaj artistoj, kun bela strando kaj klaraj lumoj, paradizo de la suno rigardanta Mediteraneon, ĝi gardas ankoraŭ viva la gracion kaj memoron de la neforgesebla Al-Andalus per multnombraj restaĵoj inter kiuj elstaras la alkazabo.

En la Malago de tiu memorinda epoko naskiĝis la granda filozofo kaj poeto Avicebrón (1020-1057), alinome Ibn Gabirol; loĝis aŭ naskiĝis poetoj tiel famaj kiel al-Rusafi, Ibn al-Sayj al-Malaqi, Ibn al-Hägÿ, Abd al-Wahhâb al-Malaqi, Ibn al-Sarrây kaj multaj aliaj. Ni okupiĝos hodiaŭ pri du poetoj malaganoj, pri kiuj malmulte oni scias. Unu el ili estas: Abû Yafar ibn al-Lama'i, naskiĝinta en Malago en la 11-a jarcento. Tre juna ankoraŭ, li jam elstaris kiel talenta homo, tial li estis vokita al la kortego de la berbera sultano de Malago, Ali ibn Hammûd, kie li oficis kiel sekretario de la sultano mem. Li elstaris kiel poeto, kaj lia nomo aperas kiel tia en "La libro de la standardoj" kaj en "Al-Dajira". Jen poemopeco trovebla en unu el tiuj verkoj:



Meze de la nigra nokto
nubo flugis tutgracia:
balanciĝis ĝi timema
same kiel ŝanceliĝas
hom' iranta plej sencele
aŭ kun la pied' vundita.
Kaj zefir' disigis perlojn
el lukskolier' fascina
de la nubo promenanta
en la milda nokt' intima,
kaj, volante ilin serĉi,
ĝi lumigis lampojn brilajn,
kaj la nokto per la fulmoj
montris sin pli emocia...

La alia poeto pri kiu ni devas paroli estas Abû-l-Qasim ibn al-Saqqat, menciita de la eminenta arabisto Emilio García Gómez, sed pri kiu oni scias nur, ke li nas-

kiĝis en Malago en la 12a jc. Jen la sola poemo, kiun mi konas de li verkita:

FESTO EN ĜARDENO

Sub la ombr' de tiu tago
giris niaj amdeziroj
kiel astronomaj sferoj
sopirantaj pri feliĉo.

Tiujn horojn ni pasigis
en ĝarden' kun ĝojo-vibroj,
kie nigra nub' vaganta
per la sabr' de fulmobrilo
en la ektagiĝo servis
trinkon al la invititoj.

Ruĝa vino al ni donis
por dormo-kusenoj mirtojn,
florbukedojn tre komfortajn
inter bosko-verd' kaj triloj.
Ni aspektis kiel reĝoj
meze de plej pompa rito.

Amo-man' nin lerte tredis
por amor' kaj iluzio:
amo estis la fadeno,
estis ni la perlo-bidoj.

Nin atakis, kvazaŭ lancoj,
la fraŭlinaj mamocicoj,
ni nur uzis por defendo
niajn haŭton kaj sentivon.

Antaŭ ni vizaĝoj ĉarmaj
malkovriĝis en la nigro,
ŝajnis lunoj plekto-noktaj
dolĉridetoj de knabinoj.

Kaj, krom tiuj du poetoj preskaŭ nekonataj, permesu al mi menciigi alian sufiĉe prestiĝan, Abd al-Rahman ibn Muĝana, poeto loĝintan en la kortego de Idris la 2a Ibn Yahyā ibn Ali ibn Hammūd (m. 1055). Li dediĉis al tiu kalifo plurajn poemojn inter aliaj ĉi tiun:

Jam l' unua ektagiĝo
helis por mi lume klara.
Donu al mi vinon, antaŭ
ol la muezin' preĝklama
firme krios kun soleno:
"nur Alaho estas granda"!

Post miksiĝ' de vin' kaj akvo
vaste sur la frunt' gutadas
inter liaj tristaj faltoj
kvazaŭ fajnaj perloj saltas
kaj unue ili ŝvebas,
jen bobel' aerpendanta,
poste turnas kiel ringoj
antaŭ kamelnazo kalma.

Plaĉas drinki dum festenoj
kun junuloj malavaraj,
kiuj montras sin ĝentilaj,
mirtojn ŝerce interŝanĝas;
plie, ili trinkas vinon,
kiun knabo bel-vizaĝa
verŝas haste laŭ rapido
de gazelo vigle arda...

Rigardadi belan knabon
ĉiam estas ja agrabla,
kiam sur l' eburan frunton
la gagataj haroj falas,
aŭ kiam ekfloras rozo
sur jasmena vango pala.

Sub la ombro de la alkazabo multnombraj poetoj prikantis
dum jarcentoj la selektan vinon, la dolĉajn figojn mondfamajn
de tiu ĉi tero... la belecon senkomparan de la verdaj ĝardenoj,
la oran sunon kaj parfumitajn noktojn de la bela Malago, revan-
ta tie apud la arĝenta maro.

Lia branĉ-talio kurbas
kvazaŭ sablmontet' elstara,
kaj el nokte nigraj haroj
ŝprucas la vizaĝo blanka.

Rozoj el la ektagiĝo
vekis per roseroj ĉarmaj
la narcisojn bonodorajn
per gutado kvazaŭ larma,
dum Plejadoj estingiĝis
en la horizonto rava,
same kiel la jasmenoj
en la blanko-hel' forsvagas...

La tenebr-flugilo nokta
fuĝas el l' aŭror' venanta,
kiel nigra korv' forflugas
kaj malkovras l' ovojn blankajn
tiam kiam sun' aperas,
restas ĉiuj blindumataj,
ja la suno estas Idris,
filo de la granda Yayä,
fil' de Ali, fil' de Hammüd
Princo de Kredantoj, fama!


Ibn Muĝäna

Antonio Marco Botella

La plej ofta...

Eventoj

Petu senpagan provekzempleron:
EVENTOJ, pk. 87. H-1675 Budapest, Hungario



RECENZO: ANTOLOGIO

DE FRANCA LITERATURO

Tri-voluma. Vol. I- 396pĝ.,
Vol.2- 402 pĝ., vol.3 -364pĝ. plus Bibliografio 56pĝ. Formato
14,1 x 19,8 cm. Prezo 350FF plus sendo. Eld. UFE,Parizo 1991.

Ne antologio. Ne "kolekto da mallongaj aŭ mallongigitaj prozaj aŭ poeziaj pecoj"(PIV). Ne diskonigcela kompilo de klasikaj ĝemoj de la franca literaturo...Legeblas ĉi-verke kompletaj e-versioj de ne ĉiam renomaj -kvankam ja alte interesaj- prozaĵoj kaj teatraĵoj -kie la superba franca poezio? el ne ĉiam konataj aŭtoroj. Duoble bonvena ideo! Ekde 198 "Franca Esperantisto" disfoje aperigis tiajn laborojn en specialaj literaturaj numeroj, kiuj nun per simpla kunmeto ricevi pli ol modestan libro-forman aspekton kaj misgvidan titolon Dumlege, kvazaŭ proteste, ĉiu el la tri volumoj disbindiĝas al siaj naturaj eroj: kajeroj pri grava beletro.

Pri la averaĝa kvalito de la esperantigoj, elreviĝo. Mi malaludas la gradon de fidelo al la originaloj, kies ĝenerala enverguro koncepta, lingva kaj situacia konstituas ja veran defion por ajna tradukanto, eĉ se tiel prestiĝa kiel la plimulto de niaj pritraktatoj. Mi nur vortumas mian impreson kiel legarinto de tekstoj en nia lingvo. Fascinaj intrigoj ie-tie fuŝitaj -foje ĝis nekomprene- per francismoj, gramatikaj tuberoj kaj koboldaĵoj. Lingva pezeco ("...tamen estis laŭ mia plaĉo treege preferinda al ĉio, kion mi trovintis plej ĝua en tio, kion oni nomas la vivplezuroj"). Agace neoportunaj transponoj ("...leksikonon, indekson, krestomation kaj tutan plenan ilustritan vortaron da insultoj..." fine de freŝa spica rakonto el la 16 jarcento!!)...

Kelkaj bonaj kontribuoj. Pluraj el ili -ekz. "Andromaka" ja brilis propralume, se ilin nur, laŭe al la varengjena konsilo, kontrolintus alilingva e-kompetentulo. Tia kontrolo kredindigas la rezultojn -tamen ne tute senajn je malglataĵoj- de "La nobela burĝo" kaj "La edziĝo de Figaro".

Rilate la elekton de la aŭtoroj kaj de ties verkoj, ĉapelon! Malkovriĝas kaŝitaj lucernoĵ (B. des Périers, Guilleragues

Courteline, Supervielle) kaj perloj ("Lokis", de Mérimée!) de la franca literaturo. Ebrigas la dolĉa veneno el la dramaturgio de Racine, Hugo kaj Cocteau. Envultas la poezio latentan en la "Persaj leteroj" kaj la rakonta majstreco de Daudet, Flaubert kaj Maurois...

Bele, se ontajn volumojn de la antologio oni flegus ĉiuflanke, laŭmerite!

Miguel Fernández

Terminologio

RAPORTO AL PEKOTEKO PRI LA NEOLOGISMA RADIKO "KOMPJUT"

La preferata termino "komputoro"

En la ĵus eldonita Plena Pekoteko 85-90(1) estas registrita ĉe referencnumero 85/408 la vorto "komputoro" kun la sekva difino:

"Elektronika aŭtomato por produkti dataojn...el aliaj dataoj per algoritma procedo, uzata por kalkulaj, kontadaj, desegnaj, tekstoprilaboraj kaj aliaj komputadaj celoj...

Aparato, kiu kapablas akcepti informojn, kiu pritraktas informojn per strikte preskribitaj procedoj, kaj kiu fine liveras la rezultojn de tiuj procedoj grandparte sen homa interveno" (pĝ. 110).


Rüdiger Eichholz, la kompilanto de PEKOTEKO, preferas la vortformon "komputoro" sed listigas ankaŭ la sekvaĵojn du variaĵojn uzatajn nuntempe de aliaj esperantistoj: "komputero" kaj "komputilo". En pluraj verkoj Eichholz prezentas argumentojn por provi provizi nur la formon "komputoro" kun la difino, kiun li donas al ĝi.

Pli da terminologiaj variaĵoj

Okaze de detala esploro, kiun mi entreprenis, pri la diversaj terminoj uzataj aŭ proponitaj de esperantistoj dum la pasintaj dudek jaroj, mi kompilis liston de entute dek sinonimoj. Krom la tri menciitaj en la PEKOTEKA registraĵo, mi trovis jenajn vortojn: "komputro", "komputatoro", "kompjuterio", "kompjutro", "komputrilo", "kompjutatoro", "ordinatorio" (2).

Enketo kaj voĉdonado

En 1975 Eichholz organizis enketon por decidi pri la plej ĝusta formo, kaj en la sekva jaro ok kandidat-vortoj estis prezentitaj por voĉdonado. La re-



zultoj de la voĉdonado en 1976 evidentigis, ke fiaskis la provo de Eichholz solvi la terminologian problemon. Sekve, la kaosa nomenklatur-restis en la fakliteraturo kaj ankaŭ en laikaj publikigaĵoj ĝis la hodiaŭa tago! Cetero, la fakula mondo dividiĝas en du rivalajn grupojn, la komputoristojn kaj la komputilistojn. Ie en nenieslando estas malgranda grupo da komputeristoj, kiuj estis preskaŭ forgesitaj pro la arda polemikado. Dume, Eichholz daŭre insistas, ke "komputoro" estas la plej preciza termino kaj "komputilo" devas ricevi novan, pli ĝeneralan signifon (vd. PEKOTEKO-registraĵon 89/051). Plue, Eichholz rifuzas konsideri la vortformon "komputero", kiu estis registrita en Plena Ilustrita Vortaro(PIV) en 1970, ĉar liaopinie tiu vorto ne estas uzata nuntempe.

Male, miaj esploroj montris, ke estas ankoraŭ pluraj esperantistoj, kiuj preferas "komputero".

Malsukceso en Akademio de Esperanto

La dujardeka dornhava terminologia problemo finfine estis prezentita al Akademio de Esperanto en 1982. Ne okazis pozitivaj rezultoj, ĉar la afero estis taskita al Rüdiger Eichholz, kiu jam en 1975 faris la unuajn mispaŝojn. En 1989 d-ro André Albault, la prezidanto de la Akademio, amare kaj senhonte konfesis, ke "La disputo pri komput-il, -oro ŝajne eterniĝas" (Monato, decembro 1989, pĝ. 5).

La bizara neologisma radiko "mantor-"

Kiel fina ago de senespero, la prezidanto de Akademio de Esperanto, en letero al la redakcio de Monato, en la numero citita ĉi-supre, proponas novan sinoniman radikon, venantan de la sanskrita lingvo: "mantor-". Ĝi estas pluformebla en la sekva maniero: "Per mantoro la mantoristoj mantoras; la fako de la mantoristoj nomiĝas mantoristiko". Tiu ĉi neologismo estas tiel bizara, ke mi neniel rekomendos ĝin por registrado en PEKOTEKO.

La nova neologisma radiko "kompjut-"

La terminologia kaoso eĉ pli densiĝas pro la lastatempa ekuzo de la radiko "kompjut-" en la sekvaj citaĵoj ĉerpitaj el la oficiala organo de la Analiza Skolo, Speciala Cirkulero 62 (aŭgusto 1993).

"VAJSO Niklaŭso, kompjutisto, elektronikisto kaj sagaca aplikanto de Fundamentkonforma Esperanto...(pĝ. 38)

"La laboro, kiu nun ankoraŭ devas esti farata, kuŝas en la manoj de KLIENO Kristofa, kompjutilfakulo kaj treege severa kontrolanto de ĉio..." (pĝ. 39).

(Rimarku, ke antaŭ kelkaj jaroj Esperanto-Centro Paderborno, la eldonanto de Speciala Cirkulero, uzis la vorton "komputero" sur la kvara kovrilpaĝo de sia Librolisto de la jaro 1985. Kial okazis tiu posta ŝanĝo?)

Etimologio de la radiko "kompjut-"

"Kompjut-" estas fonetisma asimilado de la angla verbo compute (elp. komPJUT). Estiĝas demando, ĉu la redakcio de Speciala Cirkulero sendepende elektis tiun radikon, aŭ ĉu ĝi estas retroformita formo, bazita sur pli frua vorto. Eichholz, okaze de la organizado de sia enketo en 1975, listigis inter la terminaj variaĵoj "kompjatoro", kiun li formis per aldono de la sufikso "-ator" al la verba radiko "kompjut-". Rimarku, tamen, ke en lia listo de variaĵoj, la vortformo "kompjutilo" ne aperas, do ĝi ne estis prezentita por voĉdonado.

Konkludo

Cu la neologisma radiko "kompjut-" estu aldonita al la nocio-komplekso 85/408 de PEKOTEKO, aŭ ĉu ĝi estu rifuzita kiel senutila, balasta elemento en la Esperanta leksiko, kiu efikos nur por pligrandigi la terminologian konfuzon sur tiu ĉi tereno? Car la vorto "kompjutilo" mankas en Nepivaj vortoj, kompilita de A. Cherpillod, ŝajnas, ke uzas ĝin aktuale nur la redakcio de Speciala Cirkulero. Sekve estas atendebla pravigo de la uzo de tiu vortformo.

Bernard GOLDEN

Notoj

1. PEKOTEKO= Per-komputora termino-kolekto. Rüdiger Eichholz, kompilanto, Bailieboro, Ontario (Kanado); Esperanto Press. Plena Pekoteko 85-90, tri volumoj, 1280 pĝ., 1992.
2. Bernard Golden. Terminologia Kaoso: komputilo, komputero, komputoro. Paĝoj 105-142 en: Centjara Esperanto - Jubilea Libro de Akademianoj. Capecó-SC (Brazilo): Fonto; 1987. 240 pĝ. Vidu ĉ.8.4 (pĝ. 115) kaj ĉ.11.1 (pĝ.122-123).

Ge-kdoj: La 49a Kongreso de SAT-Amikaro okazos en kastelo Grésillon situanta en la distanco de 2 kilometroj de urbo Baugé (departemento Maine-et-Loire) de la 2a ĝis la 5a de aprilo-1994. Informoj: Kastelo de Grésillon-Maison Culturelle Esperantista, 49150 BAUGE. Francio.

JEN NIA PACKOLOMBO

Sed ne tiela. For bombastoni Ĉesu.
Nin lasu ĝin resongi viva, nuda.

Tri vualoj.

Nur tri vualoj gazaj
- unue, la memamo,
due, la ambicio,
kaj trie, la nesci' -ĝin kaŝas.

Lasu.

Nin lasu ŝovi for la vualtrion,
aŭskulti kune,

kalme

brak-en-brake

de ĝia koro la tiktakan takton,
prononci ĝian nomon,
ĝian aŭroran nomon,
ĝian sonorajn nomon dusilaban,
kaj l' movoj nialtpaj
desegne - simple - naskos packolombon.

PACOI

Jen ĝi ekflugas, soras
- pli altent pli transnubent -,
gras, akcelas!

celas

- elano kardinala -
sin skizi ĉirkaŭtere,
trafas meridianojn
plej forajn,

reaperas,

descendas kaj suriĝas
sur la gravedan ventron,
sur la infanan frunton,
sur ŝultron de oldulo,

sur la songon

de somermeza nokto,

kaj delasas

promeson sur la ventron,



scintilon sur la frunton,
serenon sur la [^]sutron,
vatitan songon sur la songon,
plumojn
sur [^]ciun lokon.

Plumojn kun surskriboj:
futuro, homo, helo, spiko,... vivo.
VIVO!

La via ne.

La vian vi [^]caspafis
- ve, packolombo niabus![^] -,
murdis,

remburis en glaciaj
pripacaj konferencoj,
ornamis plej bizara,

puca,
drola,

koŝmara kaj makabra
per viaj pompaj, pufaj vakuvortoj,
paroloj ja kondamnaj
sed ne pri l' damnaj armoj
nek pri armeoj noblaj (noblaj!)
nek pri militoj justaj (justaj! justaj!)
([^]cu povas [^]gusti [^]justaj [^]ce [^]militoj?)

Jen ni kaj vi, du timoj front-al-fronte

Ni timas kaj vi timas.

S u r l a t e r o r o - k l i n g o
a a
k k
r r
a a
r r
a a
n n
d d
e

ni - eĉ ne pleje pita
punto de l' potenco -
trenadas nin, pelate
de la teruro kosma.
Kaj nia tim' angorajn
rigardojn disradias.
Kaj la rigardoj sekvas
la spurojn de l' homeco
senlace kaj espere.

vi - moŝtaj mondo-mastroj,
al kiuj la potenco
servatas ĉiutage
sur pleto diamanta -
veturas plankene,
kaptitaj de paniko,
sed de panik' mizera,
el kiu ŝprucas vanto,
disregno, abomeno...

Ni timas

kaj

vi timas.

Ni timas kun la tremoj de gazeloj
meze de arbareg' incendiita,
Kaj mlaj manoj serĉas
nur varmon alimanan.

Vi timas kiel katoj gratvunditaj,
en gvat', la krifojn pretaj. Viaj manoj
serĉas solsole nombrojn,
dekretojn kaj fusilojn.

Prisemis vi per flagoj niajn brustojn.
(Ho, jes! Ho, jes! La praserpento vivas
vorante for naivon ankoraŭe).

Sed nin kunigas krioj dormo-ŝtele,
reeĥoj anksivekaj
el Auschwitz, Hiroŝimo, Nagasako,
Vjetnam', Afrik', Malvinoj, Persa Golfo...
Kunigas nin la ŝvelo de la nunaj
atomaj glavoj de Damoklo

- morto -

super la kapoj:

bomboj,

neŭtronbomboj

diseriguntaj l' homon, ne la aĵojn!
- ho, cindro-monto ĉe printil' klakantal -,
mil fajroj,

mil misiloj

- nur mis-iloj -.

Ĉesu!

Ĉesu bombardi nin pri l' deadmona
potenc' de l' mortigiloj.

Ĉesu emfazi pri la vort' armeo,
kies literojn ni aliordigas

por fari ĝin reamo.
amoro kaj amore.
Ĉesu ignori, ke ni ĉiuj havas
po unu amplanedon interdente.

Jen nia packolombo plukolombas.
Ni paŝtas ĝin sur kampoj de bril-astroj.
El tero ĉiam pli ekkreskas brakoj
pretaj protekti ĝin.

Aŭbadas ĥoroj,
homoj portantaj en la kor' eternan
aŭroron borealan.

Man-en-mane
ili kunkrias sole l' vorton paco
senhalte.

L' firmamenton
kovras komplete svarmoj da kolomboj.

Miguel Fernández Martín

Noto: Ci verko ricevis la premiojn "Violo" por la plej kvalita humanisma a
priesperanta poemo kaj "Natura Floro" por la plej bona konkursaĵo en la 32-a
Internaciaj Floraj Ludoj.



RECENZO: "INFERO EN AŬTUNO" de B.GOL

Romaneto, Debreceno, "Debrecena Bulteno"
1993. 47 pĝ.

Tre malfacilas paroli pri Bernard Golden sen menciigi liajn
"goldenan" artikol-verkemon. Oniklaĉe, en la redakcejo de tre
konata Eo-revuo multaj liaj artikoloj sidas en granda tirkestoj
-ĉar ili eminente taŭgas por ŝtopi blankaĵojn de ĉiu aperonta
numero. KREDU, ne kredu, mi devas tuj diri, ke mi ĉiam legas
kion ajn kun la subskribo de Bernard Golden: malgraŭ ofta
harfendismo kaj tropedanteco oni ĉiam lernas ĉe bona lingvo-
metiisto. Aparte plaĉas liaj tradraĵoj al la t.n. "analiza
skolo", kies korifeo jam okdeksepjariĝis...

Foje tamen, Golden eniras la kampon de la Esperanta prozo
Ĝis nun li publikigis la rakontarojn Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ
kaj Bestoj kaj homoj. La rapide ellegebla romaneto Infero en a

tuno tre similas ambaŭ librojn stile kaj forme. Oni same ricevas la impreson legi tradukon el anglalingva originalo sub Esperanta vesto: usonecaj tekniko, tono kaj etoso pere de abundaj dialogoj. Ŝajnas, ke la verkisto ne ĉerpis el Esperantaj fontoj por verki rakontojn, sed el sialingvaj. Kvankam la iom plataj roluloj (ne eblus aliel en tiutipa romaneto) parolas tre romanece kaj unutavole, la stilo tamen ĉiam tre klaras, eble ĉar la aŭtoro ne celas beletrajn pretendojn, sed distron kaj viglan intrigon. Ĉu sukcese?

La enhavo temas pri amafaro inter junulo kaj edzino, en kiu implikiĝas ankaŭ la edzo kaj dua amanto: murdo-projektoj kaj monaj interesoj en rapida ago-disvolviĝo kondukos al fino tragedia. La revuo Esperanto sub la Suda kruco (n-ro 6, novembro-decembro 1993) skribas pri la romaneto de Golden: "Distra novelo, facila stilo, intrigo iom surprizhava. Literatura valoro tia, al kiu oni kutimiĝis en Esperanto. Leginda, sed ne legenda". Mi konsentas, ĝuste ĉar Golden ne pretendas alton, sed nur plaĉon. En Eŭska kverko (n-ro 3) aperas anonceto pri Infero en aŭtuno: "ideala kiel postkursa legaĵo". Tute trafe kaj juste.

Nur du finaj rimarkoj: 1) la simplega kovrilo ne tro instigas al legado; 2) la libro-finaj glosoj tre bonas kaj precizas. Nehazarde, Golden sekvas sian propran rekomendon kiel akademia sekciestro pri la venonta PIV-ido.

Antonio Valén

Korespondadi deziras

La prezidanto de Rumana Esperanta Fervojista Asocio invitas al hispanaj esperantistoj partopreni en la 35a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno okazonta en POINA BRASOV (Rumanio) de la 5a ĝis la 12a de februaro 1994.

Ekzistas la ebleco plilongigi la restadon post tiu Skisemajno.

Nia rumana samideano petas al tiuj hispanaj esperantistoj dezirantaj korespondadi kun rumanoj bonvolu sendi al li la koncernajn adresojn tiucele. Interesatoj skribu: Dipl. ing. Ștefan Mihai; Str. Mircea Țel Bătrân, 39, blok. 51. Ap. 26. Ro-2200 BRASOV. Rumanio.



La movado en kaj ekster Iberio

Hago.-VEGETARANA KONGRESO HOLANDO '94.

En tiu nederlanda ĉefurbo okazos la 31a Monda Vegetarana Kongreso, de la 8a ĝis la 13a de aŭgusto 1994. La temo de la Kongreso estos: "LA RAJTOJ DE LA NATURO".

La programo estos tre riĉa kaj kvankam la lingvo uzota estos la angla, ekzistas la ebleco uzi ankaŭ Esperanton, se sufiĉe alta nombro da esperantistoj aliĝas al la kongreso kaj petas tion. Detalan programon de la Monda Vegetarana Kongreso oni povas peti al: TEVA, Poŝtfako C.P. 5050, ROMA. Italio.

Madrido. INTERESA EKSPERIMENTO.

La Ĝenerala Direktorejo pri Internaciaj Kulturaj Interŝanĝoj de la itala Ministerio pri Publika Instruado sendis inviton al la samtipaj oficejoj de Klerigaj Instancoj de Belgio, Hispanio kaj de la germana federita regiono Nord-Rejno/Vestfalio por kune aranĝi en la kvar landoj eksperimentan instruadon de Esperanto en po du klasoj de ĉiu lando por ĝelernantoj de supera mezlernejoj -16/17-jaraj. Post demarŝo de la HEP-prezidanto en la koncerna hispana Ministerio, oni promesis lin baldaŭ respondi oficiale al tiu invito.

Taŝkent. ALVOKO AL KURSGVIDANTOJ KAJ INSTRUISTOJ

En la kadro de oficiala eksperimentado, Uzbeko instruas Esperanton al 7-9 jaraj infanoj, kaj urĝe bezonas esti en rilato kun samaĝa klaso, por korespondi.

Tiu korespondado havas la celon montri la efikon de la Internacia Lingvo.

La korespondaĵoj povas esti en nacia lingvo, sed akompanataj de Esperantlingvaj tradukoj.

Aliparte, la koncerna Esperantisto deziras esti en rilato kun ICEM-Esperanto.

Oni bonvolu skribi al E. Perevertajlo (7000 Taŝkent, Poŝtadreso ab/K 140) Uzbekio.

J.C. Thumerelle (El SAT-Amikaro).



ADMINISTRA ANGULO

KONTO-ETATO DE LA REDAKTEJO DE "KAJEROJ" DUM 1993

Saldo favora al HALE la 31an de decembro 1992 . . . 4.869- Ptoj
Abonoj enspezitaj en la Redaktejo detale indikitaj
en la kvar numeroj laŭlonge de la jaro 42.400- "
SUMAS 47.269- "

ELSPEZOJ DUM 1993:

Presitaj kvar numeroj "KAJEROJ" en 1993: 24.480,-
Poŝto k. ekspedo de la kvar numeroj... 6.430,-
4 inkobendoj kaj forviŝbendoj 6.000,-
Poŝto administrado kaj korektoj..... 2.400,- 39.310,- "
En la Redaktejo: SALDO FAVORA AL HALE 7.959,-

Fina Saldo de Peranto Manau sendita al la
novelektita HALE-Kasisto k-do N.Gil Carballo ... 49.638,-
Havaĵo de HALE la 31an/12/1993 57.597,-

Noto.- Por starigi la definitivan saldon de HALE je la fino de 1993 nur mankas la Konto-Etato de nia pasinta prezidanto k-do Manuel López Hernández, kiun ni esperas, ke li tuj ĝin sendos al nia HALE-Kasisto k-do Nicolas Gil.

Pagis sian ĉi-jaran respektivan abonon:

Enrique Navarro Rubio 1.000 Ptoj
Victor Ortiz Gratal 800,-"
Nicolas López Escartín 800,-"
Maria Fernanda Ondé 1.000,-"
Sumas pago de abonantoj 3.600,-"

LASTMOMENTA INFORMO: FORPASIS FEDERICA MONTSENY!

Kiam ĉi numero de "KAJEROJ" survojis al presejo alvenis al ni la konsterna novaĵo pri la forpaso de Federica Montseny okazinta la 14an de januaro.

La librecana movado perdis unu el siaj plej elstaraj figuroj. Venontnumere ni verkos amplekse pri ŝi.

Ripozu pace la librecana batalantino!!

Kajeroj ———
— *el la Sudo*



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Str. Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Depósito legal: Z - 2398 - 88

Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas, S.A.